
# BONA ESPERO



Rundbrief für Freunde, Förderer und Mitglieder
des Fördervereins "Bona Espero" e.V.

Cirkulero por amikoj, subtenantoj kaj membroj
de la "Subtenanta Asocio de BE" e.V.

n-ro 20 Septembro 1987

Ktoj: Sparda-Bank Münster, BLZ 400 605 60 Kto-nr. 900 826 BONA ESPERO
Postgiro-Amt Dortmund, BLZ 440 100 46 Kto-nr. 2033 99-465 BE

---

Per la 20a informilo ni salutas vin hodiaŭ. Jam 6 jarojn, la unua informilo aperis en julio 1981, ni rakontas al vi pri gajaj kaj malgajaj epizodoj en BE, pri solvitaj problemoj kaj apenaŭ venkeblaj obstakloj. La raporto de Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia estis koncentraĵo de iliaj lastmonataj travivaĵoj. Ili "ripozis" 24 horojn en Telgte, reveninte el Pollando, tra Kopenhago survoje al Frankfurt. Tiakaze ankaŭ necesas meti "ripozis" inter citstreketojn, ĉar la noktoj en Telgte estas mallongaj. Do, ili estas sanaj, tio estas fakte miriga kaj kontentaj, pri tio ni ne devas miri. "Niaj infanoj eĉ dorlotas min," rakontis Ursula, kvazaŭ kortuŝita patrino. "Ili preparas la matenmanĝon sen mia helpo kaj vokas nur kiam ĝi estas farita. Tio neniam okazis post mia ekvivo en BE."

Kiel tute normala lernejo-internejo estis feriotempo en BE. La infanoj iris hejmen. La granda domo kaj la lernejo estis ŝlositaj. Restis en siaj apartaj domoj: la abelbredisto kun siaj 2 milionoj da mielproduktantoj, Dona Maria kun sia infanaro kaj la loka kuracisto kun kvar infanoj, kiu atendas la finkonstruon de sia nova domo en la proksimeco de BE. Intertempe komenciĝis la nova lerneja jaro kaj 82 scivolemaj infanokuloj ĉiumatene rigardas al Ursula kaj Giuseppe, 41 infanbuŝoj atendas manĝaĵon kaj trinkaĵon. En majo-junio, dum la rikoltotempo, venis ĉiutage rajdantoj, gepatroj de infanoj aŭ najbaroj por porti rizon, fazeolojn, maniokon, bananojn, papajojn, avojn k.a., interŝanĝe kontraŭ varmaj pulovroj kaj jakoj, ĉar la noktoj estas malvarmaj.

Elektra kurento - la ĉijara evento? Supozeble ne la sola, ĉar jam denove oni ekaktivas en BE. Ĉiujare venas multaj homoj al BE. Portempaj kunlaborantoj, kiuj partoprenas la grandfamilian vivon, aktivas en domo, ĝardeno aŭ lernejo aŭ gastoj, ĝuantaj la familian etoson, la naturajn belaĵojn, la trankvilon. Kunlaborantoj estas ĉiam bonvenaj! Nur, kie loĝigi ilin? Ni ĉiuj scias el niaj propraj spertoj, kiajn problemojn kaŭzas ofte eĉ parencoj, kiuj restas pli longe ol 2 noktojn. Kiu el la familio tiam cedu sian liton? Tiajn problemojn oni ankaŭ havas en BE, nur kun la diferenco, ke la kunlaborantoj aŭ gastoj kutime restas pli longe. "Jam necesas konstrui gastodomon," oni decidis! Nun oni estas konstruanta. Frank kaj Georg el norda kaj suda Germanio helpos konstrui. Eble ankaŭ Martha Weibel, kiu restos dum kelkaj monatoj en BE, lernos fari brikojn, kondiĉe ke la brikfabrik' (tute simpla mekanika aparato), ankoraŭ funkcias. Per ĝi oni faris antaŭ 9 jaroj la brikojn por la lernejo, poste oni uzis ĝin alterne en Alto Paraiso kaj BE. La nova domo havu 4 ĉambrojn, duŝejojn, etan kuirejon por prepari maten- kaj vespermanĝon kaj vestiblon. Elektra lumo kaj akvo ne mankos kaj supozeble ankaŭ estonte ne volontuloj, kiuj pretas donaci parton de sia vivotempo al Bona Espero.

Ni ĉiuj volas atingi la memstarecon de Escola-Fazenda BONA ESPERO! Tiel ni denove faras grandan paŝon.

---

Societaj novaĵoj! Aldone vi trovas provizoran programon pri la 'Vestfalia Aŭtuno'. Unu el ĝiaj programeroj estos laŭŝtatuta jarĉefkunveno de societo Bona Espero e.V. Tagordon vidu dorsflanke!

Mit dem 20sten Rundbrief grüßen wir Sie heute! Schon seit 6 Jahren, der erste Rundbrief erschien im Juli 1981, beschreiben wir die fröhlichen und traurigen Episoden in BE, berichten über gelöste und nicht zu ändernde Schwierigkeiten. Der Bericht von Ursula und Giuseppe Grattapaglia war vollgestopft von Ereignissen der letzten Monate. Sie hatten eine 24stündige "Ruhepause" in Telgte, auf dem Weg von Polen über Kopenhagen nach Frankfurt. "Ruhepause" in Gänsefüßchen, weil die Nächte in Telgte immer kurz sind. Also, Ursula und Giuseppe sind gesund, das ist tatsächlich ein Wunder und zufrieden, darüber brauchen wir uns nicht zu wundern. "Unsere Kinder verwöhnen mich sogar," sagt Ursula, gerührt wie eine Mutter. "Sie bereiten das Frühstück ohne meine Hilfe und rufen mich, wenn es fertig ist. Das ist mir noch nie passiert, seitdem ich in BE bin.

Wie in jeder normalen Internats-Schule war auch in Bona Espero Ferienzeit. Die Kinder waren bei ihren Eltern. Das große Haus und die Schule geschlossen. In ihren eigenen Häusern blieben nur: der Bienenzüchter und seine 2 Mill. Honigproduzenten, Dona Maria und ihre Kinderschar und der örtliche Arzt mit seinen 4 Kindern, der darauf wartet, daß sein eigenes Haus in der Nähe von BE fertig wird.

Inzwischen hat das neue Schuljahr angefangen und 82 neugierige Kinderaugen gucken jeden Morgen Ursula und Giuseppe an, 41 Kindermünder erwarten Essen und Trinken. Im Mai-Juni, während der Erntezeit, kamen täglich Reiter, Eltern der Kinder oder Nachbarn, um Reis, Bohnen, Maniok, Bananen, Papayas, Eier u.a. zu bringen und gegen warme Pullover und Jacken zu tauschen, denn die Nächte sind kalt.

Elektrischer Strom - die Errungenschaft dieses Jahres?

Wahrscheinlich nicht die einzige, man ist schon wieder aktiv!
Jedes Jahr kommen viele Menschen nach BE. Kurzzeitige Mitarbeiter, die am Leben der Großfamilie teilnehmen, sich in Haus, Garten oder Schule betätigen und Gäste, die die familiäre Atmosphäre genießen, sich an Natur und Ruhe erfreuen. Menschen sind immer willkommen, als Mitarbeiter oder Feriengäste. Nur, wo sollen sie wohnen? Wir alle wissen aus eigener Erfahrung, welche Probleme oft schon ein Verwandtenbesuch mit sich bringt, der länger als 2 Nächte dauert. Wer aus der Familie muß sein Bett hergeben? Solche Probleme gibt es auch in BE, nur mit dem Unterschied, daß Gäste und Mitarbeiter hier in der Regel länger bleiben. "Wir brauchen einfach ein Gästehaus," entschied man! Jetzt wird es gebaut.

Frank und Georg aus Nord- und Süddeutschland helfen. Vielleicht lernt auch Martha Weibel, die einige Monate in BE bleibt, Mauersteine zu machen, wenn die Maschine (ein ganz einfacher mechanischer Apparat), noch funktioniert. Damit hat man vor 9 Jahren die Steine für die Schule gemacht und anschließend ist sie abwechselnd in Alto Paraiso und BE eingesetzt worden. Das neue Haus soll 4 Zimmer bekommen, Duschen, eine kleine Küche, um Frühstück und Abendessen zu bereiten und den Flur. Strom und Wasser fehlt nicht und künftig sicher auch nicht freiwillige Helfer, die bereit sind einen kleinen Teil ihrer Lebenszeit einzubringen.

Wir alle wollen die Selbstständigkeit der Farm-Schule BONA ESPERO erreichen. Das ist wieder ein großer Schritt dahin!

---

Neuigkeiten unseres Vereins! Wir haben Ihnen heute das vorläufige Programm des 'Vestfalia Aŭtuno' geschickt. Teil des Programms wird die nach unserem Statut notwendige Jahreshauptversammlung des Vereins Bona Espero e.V. sein. Die Tagesordnung finden Sie auf der Rückseite. Wir schicken Ihnen gerne Informationen über das komplette Wochenende, Prospekte, Zugverbindungen, Zimmervermittlung u.a.

Resp.: Margret Brandenburg, Brinker Damm 24, D-4404 TELGTE